# Sándor Petőfi : La Juĝo

Historiverkojn nun mi legadis, finon atingis.
Kio la historiaro mem estas? Sango-rivero,
kiu ekintas sur nebulegaj rokoj iamaj,
kaj ĝi sen interromp', unulonge, la nunon atingas.
Oni ne kredu, ke jam malaperis, jam ĝi ripozas,
flu' ekirinta ja ĉesos sole je sin' de la maro.
Longa rivero de sang' enfalos sango-maregon.
Vidas tagojn mi teruregajn, proksimiĝantajn,
kiajn vidis Mond' ja neniam. Pac' de la nuno
estas sole la tomba silent', okazanta kutime
antaŭ tondra muĝeg', post fulm', skuegonta la teron.
Funde sekreta Futur'! Mi vualon vian aliras.
Pere de fea lumet' de la konjekt', jen mi travidas
ĝin kaj kio kaŝiĝas sub ĉi vualo, de tio
kaptas min teruriĝ', abomen', samtempe humoro
ĝoje penetras min, sovaĝarda. La Di' de Milit' sur-
metos ree kirason, el ingo tirante la glavon,
tra l' Mond' fora galopos for, sur dors' de ĉevalo,
al la popoloj vokos por la decida batalo.
Bon' kontraŭ Malbon' - la nacioj jen dividiĝos.
Malvenkinta eterne, ĉi tie, la Bono superos,
sed la triumf' plej unua ja kostos sang-oferegojn.
Estos tamen egale, jen estos tio la Juĝo,
Kiun Dio promesis per profetaro iama.
Estos tio la Juĝo, ĉi poste komenco de vivo:
Savo eterna; ni por ĝi ne devos flugi Ĉielen,
ĉar sobvenos teren jam la Ĉiel' poreterne.

Aprilo 1847.

Trad. István Szabolcs kaj Antono Samak